

- De Smet W.M.A. (1991b). *A Guide to New Biological Nomenclature* (N.B.N.), Ass. Introd. N.B.N., Kalmthout (BE), 64 pp.
- De Smet W.M.A. (1995). Nuna stato kaj perspektivoj de Nova Biologia Nomenklaturaro. *La nuna stato kaj estonteco de la internacia lingvo esperanto. Kava-Pech, Prago*, pp. 139-154.
- De Smet W.M.A. (1998). The necessity of a new form of nomenclature for naming the living world. (*nie*)
- Döhler W. (1923). Esperanto kaj la terminologio de la biontoj. *Internacia Scienca Revuo*, 7-9, pp. 21-28.
- Getting W.A. (trad.) (1961). Bild-libro pri bestoj. *Daily Mail-Press.*, 76 pp.
- Givry & Vêrax (1908a). Provo de botanika nomigado. *Intern. Scienca Revuo*, 1908, pp. 58-61.
- Givry & Vêrax (1908b). Provo de Esperanta nomigado por Zoologio. *Ibidem*, pp. 317-321.
- Halvelik M. (1970). Skatolo de Pandora kaj Ĉevalo de Troje. *Scienca Revuo*, 22, 97-99.
- Halvelik M. (1996). *The trimeral system in Biological Nomenclature. A revolutionary new approach.* Kariljono, Wilrijk (BE), 76 pp.
- Jackson J. (1995). Bestoj en la taksonomia ĝangalo. Zoologia terminkreado. *La nuna stato kaj estonteco de la internacia lingvo esperanto. Kava-Pech, Prago*, pp. 100-109.
- Kavka J. (1981). Onomastiko en fakterminoj konsidere ilian esperantiĝon. *Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko. Sc.-teĥn. sekcio Asocio Esp. Slovaka SR*, 1, pp. 6-14.
- Makking G.F. (1948). Nomoj de kelkaj plej oftaj Nederlandaj birdoj. *La progresanto*, 10, pp. 47-48, 54, 64, 70-71.
- Makking G.F. (1975). Recenzo: *Stöp-Bowitz C.*: Enkonduko en ĝeneralan biologion. *Esperanto*, 68, p. 12.
- Neergard P. (1963). La lingva problemo en la biologiaj kaj agronomiaj sciencoj. *Scienca Revuo*, 13 (1963) 103-110.
- Neergard P. (1987). Plantnomoj en la Lingvo Internacia. *Serta gratul. J. Regulo, II, La Laguna*. NOMENKLATURA KOMISIONO DE LA ORNITOLOGA RONDO ESPERANTLINGVA - Komunlingva nomaro de eŭropaj birdoj. *Esperanto Press, Cardiff, Kanado.*, 68 pp. (KNEB)
- Pilger W.F. (1992). Provizora privata listo de nomoj de bestoj. *Mamuloj. Vulpo-Libro, Lely stad (NL)*. 72 pp.
- Sachs R. (1996). Zoologia nomenklaturaro, medicina terminaro kaj Internacia Lingvo. *Scienca Revuo*, 47 (1996) 214-26.
- Stöp-Bowitz C. (1963). Kiel nomi la organismojn? *Scienca Revuo*, 13 (1963) 110-117.
- Stöp-Bowitz C. (1971). Zoologia nomenklaturaro. *Scienca Revuo*, 22, (1971) 79-90.
- Stöp-Bowitz C. (1987). Biologiaj nomenklaturaroj kaj ilia esperantigo. *Serta gratul. J. Regulo, II, La Laguna*, pp. 719-730.
- TERMINOGRAFIA KOMISIONO PRI BOTANIKO KAJ ZOOLOGIO (1994). Zoologia kaj botanika nomenklaturaro (Propono pri regularo). *UEA (Rotterdam). Terminografia Esp.-Centro*, 15 pp.
- Vilborg E. (1989-1995). Etimologia Vortaro de Esperanto: A-D, E-O, K-M, N-R. *Eldona Soc., Malmö*.
- Waringhien G. (1970). Plena Ilustrita Vortaro. *SAT, Parizo*, 1299 pp.
- Wüster E. (1923). Enciklopedio Vortaro Esperanto-Germana. Unua parto. *Leipzig: Hirt. (ne kompleta)*
- Wüster E. (kun Kirschke P. (1927). Zamenhofa Radikaro. *Leipzig: Hirt*, 88 pp.
- Zamenhof L.L. (1925). Fundamento de Esperanto, 6-a eld. *Esp. Centra Librejo, Paris*, 182 pp.

Adreso de la aŭtoro

OProf. Dr. Dr. Wim M. A. DE SMET

Hertendreef 12

BE - 2920 Kalmthout / BELGIO

Priaŭtoro informo

Zoologo, Dr.sc., Dr.sc.nat., OProf. ĉe AIS. Fondinto, prezidanto kaj "motoro" de Asocio por Enkonduko de Nova Biologia Nomenklaturaro (N.B.N.).

Bibliotekoj kaj muzeoj rilate al Esperanto

Peter ZILVAR

Enkonduko

Diligentaj kaj klarvidaj homoj respektive Esperanto-kluboj iam iniciatis la nuntempe famajn Esperanto-bibliotekojn, arĥivojn kaj muzeojn en nemalmultaj landoj kaj regionoj. Por konservi la jam tre riĉan kaj multflankan kulturon en Esperanto (kaj eble de la planlingvistiko entute) nepre necesas indaj kolektaĵoj.

Kion oni povas kolekti?

Oni povas kolekti librojn (lernolibrojn, vortarojn, romanojn, faklibrojn, infanlibrojn, fabelojn, rakontojn, poemarojn, ktp.); libretojn, broŝurojn, prospektojn pri urboj, produktoj kaj varoj; vidbendojn (videojn); muzikon (diskojn, sonbendojn, muzikkasedojn, kompaktdiskojn); diapozitivojn (lumbildojn); fotojn aŭ fotoalbumojn; afiŝojn en Esperanto aŭ pri Esperanto; interesajn leterkovertojn; aŭtografiojn de famaj Esperanto-pioniroj; filatelajojn (poŝtmarkojn, unua-tagajn kovertojn, specialajn poŝtstampojn); bildkartojn; interesajn korespondajojn; varbilojn (ekz. glumarkojn, stelojn, tasojn kaj telerojn kun surskriboj).

Tiu ĉi listo certe estas nekompleta kaj oni mem havu pluajn ideojn rilate al tio, kio povas esti kolektinda aŭ konservinda. Oni povas trovi erojn rilate al Esperanto ĉe pul-bazaroj kaj en la interreto.

La gravaj taskoj de bibliotekoj (kompreneble analoge ankaŭ arĥivoj kaj muzeoj) estas: kolekti, ordigi, prilabori, konservi kaj ebligi praktikajn utiligojn por sciencistoj, interesatoj kaj studentoj.

La unuaj paŝoj

En la jaro 1980 *Marinko GJIVOJE* el Zagrebo esploris la siatempajn Esperantajn bibliotekojn kaj muzeojn en la mondo. Ĝenerale la kolektaĵoj inkluzivas ankaŭ verkojn en aliaj planlingvoj, do interlingvistikon. Tamen nur malpli ol 5% de la verkoj rilatis ne al Esperanto.

GJIVOJE estis vere pioniro por eltrovi la Esperanto-kolektojn en la mondo, tute egale ĉu publikajn, asociajn, societajn aŭ privatajn. Li tuj rimarkis, ke tio estis nur nekompleta esplorado, ĉar ne ĉiuj Esperanto-bibliotekoj troviĝis kaj troviĝas en Eŭropo. Ni ja scias, ke dum la diktaturoj en Eŭropo, precipe sub la svastiko, la juddevenaj libroj (kiel oni rigardis Esperanton) estis oferdonitaj en la flamojn. Feliĉe Esperanto – spite de multaj persekutoj – vivas kaj "nia paca kunbatalantaro" daŭre evoluigas ĝin. Aparte admirinda estas la konstanta multĝenra libroproduktado.

La Universala Decimala Klasifiko (UDK)

En la jaro 1895 oni fondis en Bruselo Internacian Instituton de Bibliografio (*Institut international de bibliographie*) kaj akceptis la Universalan Decimalan Klasifikon (UDK) de *Melvil DEWEY*, kiu inventis en la jaro 1876 tiun unuecan, internacie aplikitan ord(ig)sistemon por bibliotekoj. Cetere la plej kompleta katalogo kun pli ol 2500 paĝoj en la jaro 1953 estis la germana versio (laŭ decimala klasifiko). La UDK ampleksas la kompletan homan sciencon, kiun oni dividas en 10 ĉefajn fakojn.

Mi citas el la "Konsultlibro pri Esperantaj Bibliotekoj kaj Muzeoj" de *Marinko GJIVOJE*:

- 0 = Ĝeneralaĵo (Universalaj Fundamentoj, Bibliografio, Enciklopedioj, Societoj, Kongresoj, Muzeoj, Gazetaro, Manuskriptoj kaj aliaj)
- 1 = Filozofio
- 2 = Religio, Teologio
- 3 = Sociaj Sciencoj (Statistiko, Politiko, Juro, Edukado kaj similaj)
- 4 = Libera Fakoj
- 5 = Matematiko. Natursciencoj
- 6 = Aplikataj Sciencoj. Medicino. Tefiniko
- 7 = Arto. Arĥitekturo. Muziko. Distro. Sporto
- 8 = Lingvoj. Lingvoscienco. Belartoj
- 9 = Geografio. Biografioj. Historio

Tiujn fakojn oni povas diskonstruadi resp. subklasifiki per aldono de pliaj ciferoj, ekz. 2 = Religio. Teologio

- 28 = Kristanaj eklezioj kaj komunumoj
- 284 = Protestantaj eklezioj kaj sektoj
- 2845 = Hugenotoj

Al la simbolo oni ankoraŭ povas laŭbezone aldoni komunajn subfakojn, ekz. formon de publikaĵo:

- lernolibroj (75)
- periodaĵoj (05)
- loko (ekz. 438 = Pollando)

La simbolo 282 (05) (438) = 0892 do signifas "katolika revuo en Esperanto, aperanta en Pollando".

Bibliografioj aŭ Katalogoj

Kelkaj bibliografioj el nia movado feliĉe verkis detalajn listojn de la libroj, manuskriptoj, ties verkistoj, eldonistoj, kiuj pritraktis nian temon rilate al Esperanto resp. al interlingvistiko. Tio grave helpas por niaj superrigardoj kaj lingvistikaj esploroj. Fakte ekzistas relative multaj bibliografioj, sed ofte en neaktualigitaj formoj. Kiel sinonimon por bibliografio oni uzas ankaŭ "Katalogo".

Nur kelkajn gravajn bibliografiojn resp. katalogojn mi mencias:

- Bibliografio de Esperanto. Parto Unua. Volumo Unua. Paris, ECO, 1912, 106 p. (Aperis kelkaj eldonoj sub la lerta redaktado de generalo *SEBERT* en la serio "Esperantista Dokumentaro".)
- *Georg DAVIDOV*: Bibliografio. 1. Katalogo de la Biblioteko (1888-1911), *Wolfenbüttel, Heckners Verlag*, 1911, 129 p.
- *Katalog der Plansprachenliteratur der Universität Saarbrücken, Reinhard Hauptenthal, Saarbrücken* 1977, VI + 50 p.
- Decimala Katalogo de la planlingva literaturo ĉe Universitata Biblioteko de la Katolika Universitato *Lublin* (K.U.L.), *Edward T. Wojtakowski*, 1979 XI + 306 p.

Ĉe nia *Esperanto-Gesellschaft Südharz* (EGS) en *Herzberg am Harz* ni jam posedas ekz. jenajn verkojn:

- Bibliografio de Internacia Lingvo. Historia sistema katalogo de filologia, lingvistika kaj poliglota literaturo pri universala alfabeto, filologia gramatiko, signaro, gest-lingvo, pazigrafio, internacia helpa lingvo kaj logistiko. Ellaboris kaj komentariis *P. E. Stojan* (licenciulo en sciencoj), 1929. Bibliografia Servo de Universala Esperanto-Asocio, *Tour de Lille, Genève*, Svislando, presejo de *Paul Göring, Schmidtstrasse 1, Magdeburg* (reprezo de *Georg Olms Verlag Hildesheim* el la jaro 1973). Ĝi enhavas jam 6333 titolojn.
- Alfabeto Katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo, Vieno, Parto 1, literoj A-L de la verkoj troveblaj en la biblioteko, escepte la gazetojn. Verkita de *Hugo Steiner*, fondinto de Internacia Esperanto-Muzeo.

Eldonis: I.E.M., Wien, Aŭstrio, 1969 (multobligis: *Österreichische Nationalbibliothek, Wien*, 462 p.)

– Katalogo de la Esperanto-Kolektaĵo de *Károly FAJSZI* el Budapeŝto (Libroj I. parto), 1991 (542 p.)

– Esperanto-Katalogo 2001, Universala Esperanto-Asocio (191 p.) Temas pri aĉeteblaj libroj, kompaktdiskoj kaj tiel plu ĉe la Centra Oficejo de UEA.

Bibliotekoj kaj muzeoj

En nemalmultaj landoj ekzistas bibliotekoj kaj arĥivoj rilate al Esperanto, ofte ili havas la ejon ĉe Esperanto-Instituto, ekz. en Israelo kaj Japanio. Mi nur provas iom priskribi eble la plej signifajn, kvankam mi ne ĉiam povas garantii pri aktualeco kaj kompleteco. Estas ankaŭ grava tasko por iu aktivul(in)o foje sendi detalajn enketilojn al ĉiuj nuntempaj arĥivoj, bibliotekoj kaj muzeoj, kiuj rilatas al Esperanto kaj al internaciaj lingvoprojektoj.

Aŭstrio: Internacia Esperanto-Muzeo, Wien

La plej konata muzeo por Esperanto certe estas Internacia Esperanto-Muzeo (IEM) en Vieno. La vere aktiva frato de Ludoviko, nome *Felix ZAMENHOF*, argumentis jam dum la 19-a Universala Kongreso en *Gdansk/Dancigo* por iu internacia muzeo pri Esperanto. Oni decidis ankoraŭ atendi la 50-jaran jubileon de Esperanto en la jaro 1937.

Tamen iu partopreninto de la kongreso fariĝis pioniro sur tiu kampo, nome *Hugo STEINER* (1878-1969). Spite de la malbonaj ekonomiaj tempoj oni fondis en la jaro 1927 en la Viena kafejo *Postsparkasse* "Asocion de la Amikoj de Internacia Esperanto-Muzeo". Oni komencis en ĉevalbarako, kolektis monon kaj kontaktis influricajn politikistojn.

Jam en 1929 *STEINER* gajnis d-ron *Bick*, la ĝeneraldirektoron de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Ili subskribis kontrakton, kaj ekde tiam la Internacia Esperanto-Muzeo fariĝis oficiala parto de la Nacia Biblioteko. Krom *STEINER* tie laboris du pagitaj dungistoj. Librodonacojn oni gajnis malavare el la tuta mondo. Ekde la jaro 1930 la muzeo eĉ ricevis salonegon en la impona *Hofburg*. En la jaro 1938 (sub la svastiko) la Internacia Esperanto-Muzeo estis fermita kaj la fondinto *Steiner* "ŝirmarestita". Lia kunlaboranto *Gustav WEBER* estis mortturmentita en koncentrejo antaŭ la militfino en aprilo 1945. Mirakle kaj feliĉe la plej granda parto de la libroj kaj aliaj materialoj tamen travivis la teruran diktaturon. La libroj kaj materialoj estis kaŝitaj en iu keloangulo de la *Hofburg*.

La avantaĝoj de tiu fama Internacia Esperanto-Muzeo (IEM) estas:

1. oni povas veni kaj studi surloke;
2. oni povas peti informojn skribe aŭ telefone pri la havaĵoj de IEM;
3. oni povas pruntepreni librojn en eŭropaj landoj pere de universitataj aŭ naciaj bibliotekoj;
4. oni eĉ ricevas fotokopiaĵojn (kontraŭ pago) de la multobligita centro de Aŭstria Nacia Biblioteko.

Pli ol 21 000 libroj troveblas en IEM. La elektronika katalogo TROVANTO estas granda helpilo. Esperanto funkcias eĉ kiel serĉlingvo. Jam nun oni povas serĉi tie inter 15 000 dokumentoj laŭ diversaj kategorioj, ekzemple laŭ aŭtoroj, temoj kaj titoloj.

Pluajn informojn ĉe: Internacia Esperanto-Muzeo, *Hofburg, Michaelerkuppel*, A 1010 Wien, Aŭstrio (Tel. 0 1/53 55 145). Tie laboras ĉiutage tri personoj. Retpoŝta adreso: <plansprachen@onb.ac.at> Hejmpaĝo kaj retkatalogo: <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm>. Hejmpaĝo kun la elektronika katalogo TROVANTO: <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm>

Belgio: Esperanto-Fondaĵo Kortrijk

estas fondita en la jaro 1973 kiel oficiala sekcio de la Urba Publika Biblioteko, *Leiestraat 30*, BE-8500 Kortrijk, Belgio (tel. 056/ 20 50 87; rete: hugr@uea.org) kun ĉ. 10 000 libroj kaj jarkolektoj de revuoj. Ekzistas ankaŭ mankollisto de revuoj.

Britio: Esperanto-Biblioteko, Londono

Tiu biblioteko (iam ĉe la universitato Londono) estas verŝajne la plej ampleksa kolektaĵo (kun pli ol 30 000 eroj, t.e. libroj, broŝuroj kaj jarkolektoj de periodaĵoj) kaj troviĝis dum jardekoj ĉe la Universitata Biblioteko aŭ ĉe BEA en Londono.

Dum la lastaj jardekoj ĝi vegetadas kaj nur en la jaro 2002 ĝi estas transdonita al Brita Esperanto-Asocio (BEA), kiu nun denove volas ordigi kaj daŭrigi la gravan agadon. Ekde septembro 2002 la granda Biblioteko Butler (nomita laŭ la fama brita Esperanto-pioniro *Montagu Christie BUTLER*, sekretario de BEA) troviĝas en la nova brita sidejo ĉe *Wedgwood Memorial College* en Barlastono, *Stoke-on-Trent*, kie ekde kelkaj jaroj jam okazas Somera Lernejo.

Bulgario: Bulgara Nacia Biblioteko, Sofia

jam en la jaro 1975 tiu biblioteko disponis pri 11 500 libroj en kaj pri Esperanto. Bedaŭrinde la libroj rilate al Esperanto ne troviĝas en aparta ejo, sed inter la aliaj libroj de tiu granda ŝtata biblioteko.

Francio: 1) Kulturdomo Kastelo *Grésillon*

Krom funkcioj kiel feriejo kaj kursejo en Kastelo Grezijono, FR - 491 50 *Baugé*, tie troviĝas ankaŭ impona biblioteko.

2) Nacia Esperanto-Muzeo, *Gray*

La Nacia Esperanto-Muzeo, *19 rue Victor Hugo*, FR - 701 00 *Gray* funkcias kiel publika arĥivejo, dokumentejo kaj konstanta ekspozicio de Esperanto.

Germanio: Germana Esperanto-Biblioteko, *Aalen*

Ĉirkaŭ la jaro 1970 pastoro *Adolf Burkhardt* komencis kolekti librojn kiel komisiito por Germana Esperanto-Asocio. Danke al la senlaca laborego dum jardekoj ekestis vere impona biblioteko. Nemalmultaj homoj subtenis tiun projekton per donacoj de libroj kaj gazetoj, kaj konstante praktika helpado. Ekde kelkaj jaroj ĝi troviĝas ĉe la Urba Biblioteko de la virtemberga urbo Aleno. Dum la malfermaj horoj de la publika biblioteko oni povas trovi tie pli ol 11000 erojn. Cetere per la surloka urba biblioteko (per la t.n. ekstera prunteprenado) en Germanio oni povas pruntepreni librojn rekte el Aleno. Pluaj aktualaj informoj troveblas ankaŭ en la reto. Germana Esperanto-Biblioteko: *Gmünder Strasse 9*, DE-73430 *Aalen* / Germanio. Tel.: 07361-8606, <khsh@uea.org> www.cs.chalmers.se/martinw/esperanto.aalen

Krom Aleno ekzistas en Germanio ankaŭ aliaj konsiderindaj brokolektoj, ofte en privata posedo. Ekzemple *Dr. sc. Detlev Blanke* en Berlino posedas preskaŭ 3000 librojn. Tio inkluzivas esperantologion (kun literaturaj verkoj), interlingvistikon kaj lingvistikon. La Esperanto-Klubo en Munĥeno kaj la Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo ankaŭ havas proprajn brokolektojn.

La relative nova E-biblioteko en Ŝlesvig-Holstinio jam disponas pri pli ol 2000 eroj. Ankaŭ la Esperanto-klubo en Hamburgo kolektas librojn. En Berlino familio *Tautorat* posedas relative grandan privatbibliotekon, danke al la aktivadoj de *Hermann TAUTORAT*. Ankaŭ kelkaj universitatoj havas etajn kolektojn pri Esperanto kaj planlingvistiko, ekz. la universitato en *Saarbrücken*. La *Fritz-Huser-Institut*, *Ostwall 64*, DE-44122 *Dortmund* posedas pli ol 700 librojn en kaj pri Esperanto; pli ol 150 periodaĵtitolojn, 400 afiŝojn, fotojn, ktp. Oni kolektas precipe materialon rilate al la iama laborista Esperanto-movado.

Hispanio: Hispana Esperanto-Muzeo, *San Pablo de Ordal*

La impona muzeo estis inaŭgurita en la jaro 1968. La katalogo el la jaro 1993 nombras 8 400 librojn kaj 12 315 jarkolektojn de 2 485 periodaĵoj. La Hispana Esperanto-Muzeo troviĝas en la strato *Doctor Zamenhof 12*, ES - 08739 *San Pablo de Ordal*, Hispanio, Tel. 093 89930 03, Retadreso: <muzeo.esperant@redestb.es>

Hungario: Esperanto-Kolektaĵo *Fajsz*, *Budapest*

Detalojn pri tiu ĉi katalogo mi jam menciis sub la ĉapitro "Bibliografioj". En la jaro 2002 tiu ĉi impona privata biblioteko (s-ro *Fajsz* kolektas librojn, gazetojn, ktp. ekde la jaro 1970) fariĝis parto de la Nacia *Széchenyi*-Biblioteko en Budapeŝto. La konkretan adreson mi ankoraŭ ne povis trovi.

Italio: Nacia Esperanto-Biblioteko kaj Arĥivo, *Massa*

Ĝi estas biblioteko de Itala Esperanto-Federacio, fondita en 1972 de d-ro *Mario Dazzini*. La kolekto kun ĉ. 7250 volumoj nun apartenas al la Ŝtata Arĥivo de la urbo *Massa* kaj oni povas publike viziti ĝin. La Nacia Esperanto-Biblioteko kaj Arĥivo troviĝas en *Via Sforza 3*, IT-54100 *Massa*.

Nederlando: 1) Internacia Esperanto-Instituto, *Den Haag*

Respektindan bibliotekon jam pastro *Andreo CSEH* komencis. Tiu fama instruisto kaj inventisto de la rekta instrumentado (*Cseh*-instruado) eldonis ankaŭ la magazinon "La Praktikanto". Nun *Atilio O. ROJAS* pligrandigas kaj aktualigas la kolekton en la domo de Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago. Jen la aktuala adreso de IEI: *Riouwstraat 172*, NL-2585 *HW Den Haag*, Nederlando; tel. 070/358 44 22 <iei001@tiscali.nl>

2) Biblioteko *Hector HODLER*, *Rotterdam*

Ĝi troviĝas en du grandaj salonoj de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Bedaŭrinde mankas ankoraŭ bibliografio resp. katalogo, sed verŝajne ĝi estas unu el la plej ampleksaj kolektoj kun multe pli ol 10 000 diversaj libroj. Ĉe la nuna libroservo de UEA momente estas akireblaj pli ol 4000 diversaj eroj, kompreneble grandparte libroproduktaĵoj el la lastaj jaroj. Adreso: Universala Esperanto-Asocio, *Nieuwe Binnenweg 176*, NL-30 15 *BJ Rotterdam* (telefono: 3110 436 1044, fakse: 3110 436 1751, rete: <uea@uea.org> hejmpaĝo: <http://www.uea.org> p.s. Cetere la t.n. "Instituto *HODLER* '68" asignas etajn subvenciojn, ekz. por libroeldonado. Biblioteka apogo: *Roma* kaj *Poul THORSEN*: Ekde la jaro 1997 ges-roj *THORSEN* subvencias libroaĉetojn ĉe UEA por neŝtataj bibliotekoj.

Skotlando: Esperanto-Biblioteko de la verkisto *William AULD*, *Dollar*

La fama verkisto, kiu mem produktis pli ol 80 verkojn en Esperanto (originaloj kaj grandparte tradukoj, lernolibroj, ktp.) posedas mem pli ol 4000 librojn en Esperanto. En la jaro 2003 la impona privata biblioteko iros en la posedon de Librejo de Nacia Biblioteko de Skotlando.

Svislando: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI), *La Chaux-de-Fonds*

Tiu centro, precipe por interlingvistiko, estas la plej ampleksa sur tiu ĉi

kampo. Kun pli ol 20 000 unuoj ĝi eble estas la plej kompleta en la mondo por sciencistoj, precipe por (inter)lingvistoj. CDELI troviĝas en *La Chaux-de-Fonds, Rue du Progrès 33*, kaj estis fondita en la jaro 1967. Responde-cas kiel longjara arĥivisto *Claude GACOND*. Kvankam plej ofte matene li tie honorofice laboras, oni nepre antaŭe anoncu la viziton sub lia privata telefonnumero: 032/9265232. CDELI estas oficiala parto de la Urba Biblioteko.

Uzbekio: Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, *Samarkand*

Tie admirindas pli ol 20 000 eroj el pli ol 100 landoj. La celo estas antaŭenigi pacon kaj tutmondan konscion. Ĉu tiu estas eta konkurenco de nia nuna ekonomia mondo al la ofte propagandita t.n. "mondvilaĝa filozofio"? La muzeo estis fondita en la jaro 1986. Jen la adreso: Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, Poŝtkesto 76, *UZ-Samarkand*, Uzbekio <imps@uea.org>

Fakliteraturo

- BUTLER M.C.: Klasifo de Esperantaj Temoj, Eldono No. 1 de la "Esperanto Filmo-Grupo", *Bergen Op Zoom*, Nederlando, 1950
- Esperanto-Katalogo, libroservo de UEA, *Rotterdam* 2001
 - FAJSZI Károly: Katalogo de la Esperanto-Kolektaĵo de Károly Fajsz, Budapeŝto, Libroj, 1-a parto, *Országos Idegennyelv Könyvtár, Budapest*, 1991
 - GJIVOJE Marinko: Konsultlibro pri Esperantaj bibliotekoj, propra eldono, *Zagreb* 1980
 - GJIVOJE Marinko: Panoramo de Esperanta Literaturo, IKS, *Zagreb*, 1979
 - Internacia Esperanto-Muzeo: Historio, Taskoj, Perspektivoj. IEM, *Wien*, 1992
 - Jarlibro de Universala Esperanto-Asocio (UEA) 2002
 - Revuo Esperanto de UEA, monato: Oktobro 2002 (p.211)
 - Revuo Esperanto de UEA, monato: Novembro 2002 (p.236)
 - STEINER Hugo: Alfabeta Katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, parto 1, (literoj A-L). IEM, *Wien*, 1969
 - STOJAN P.E.: Bibliografio de Internacia Lingvo, UEA, *Genève*, 1929
 - Rete: Esperanto-Biblioteko, Vikipedio, 2002
 - Rete: Germana Esperanto-Biblioteko, Aleno, 2002
 - Rete: Virtuala Esperanto-Biblioteko
 - Rete: Pri *William Auld*

Aŭtora adreso

Peter ZILVAR <zilvar@t-online.de>

Grubenhagenstrasse 8

DE - 37412 - *Herzberg am Harz*, GERMANIO

Priaŭtora informo

La aŭtoro studis plenkreskulan klerigadon ĉe la ekstera universitato en *Hagen*. De 1998 ĝis 2002 li studis (ekstere) interlingvistikon ĉe Universitato *Adam Mickiewicz* en *Poznań*, Pollando. En septembro 2002 li sukcese defendis la diploman disertacion pri lingvistika temo sub prof-ro *John C. Wells* kaj d-rino *Iona Koutny*. Kiel komisiito de GEA por pliklerigado en Esperanto li nuntempe organizas kaj estras persistemajn studsesiojn, i.a. por klerigi estontajn Esperanto-instruistojn.

Sofrologio kaj la kuracanta vorto *)

André ALBAULT

Enkonduko

Esence sofrologio estas scienco kaj medicina praktiko. Kiel scienco ĝi estas medicin-branĉo, kiu studas la konsciostatojn kaj konscio-nivelojn, kiel ankaŭ iliajn modifojn per fizikaj, ĥemiaj kaj precipe psihologiaj rimedoj. Tiu medicina branĉo estis fondita en 1968 fare de d-ro *CAYCEDO*, neuropsihiatro en Barcelono, Hispanio, nun reveninta en sian naskolandon Kolombio. Kiel medicina praktiko sofrologio estas uzado de la diversaj tipoj de individuaj au kolektivaj rilaksadoj, prezentitaj jam en 1984 de *PAVLOV*, la malkovrinto de la kondiĉitaj refleksoj, kaj ĝustigitaj de tiu epoko ĝis hodiaŭ fare de diversaj aŭtoroj. Estas du kategorioj de rilaksadoj: la pasivaj reprezentitaj precipe de la "training autogène" de *SCHULTZ* kaj la aktivaj, inter kiuj dominas la dinamikaj rilaksadoj de *CAYCEDO*. Oni do povus opinii, ke temas pri freŝdataj nocioj. Tamen ŝajnas, ke iuj el tiuj nocioj estis jam konataj de la antikvaj Grekoj.

La antikvaj Grekoj

Fakte la antikvaj Grekoj, samtempe kiel medicinajn rimedojn, uzadis kantojn kaj sorĉkantojn por resanigi vundojn, kiel oni povis tion legi en la *Iliado* kaj la *Odiseado*. Diversaj malsanoj estis tiel same traktitaj. En Korinto, *Antiphon* verŝajne estis unu el la unuaj psihologoj de Okcidento: li povosciis mildigi la afliktitojn el iliaj ĉagrenoj per sorĉkantoj au per arte kodigitaj diskursoj: apud la "agoro", publika placo en antikvaj helenaj urboj, lia konsultejo, ŝilde indikita, neniam estis malplena.

*) Publika prelego antaŭ la *Association Polytechnique des Pyrénées Orientales* en la "Palais des Congrès" de *Perpignan* / Francio je la 9-a de Marto 1985, origine en la franca lingvo; de la aŭtoro esperantigita por publikigo en *Scienca Revuo*.